iberan karakteron, fakte, ĝia oficiala titolo estis, krom “Tria Hispana Kongreso de Esperanto”, ankaŭ “Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj”. En septembro de ĉi tiu jaro forpasis Ricardo Codorniu, la plej elstara figuro de la hispana esperantismo. Estis en tiu sama jaro, 1923, kiam la Generalo Miguel Primo-de-Rivera faris sian militistan puĉon kontraŭ la konstitucia ordo de la lando. Lia diktaturo daŭris sep jarojn, ĝis 1930, sed la granda eraro de la Reĝo, permesi tiun situacion, estis fatala por la monarkio mem, kiu estis anstataŭita de la 2a Respubliko unu jaron poste (1931).

En la jaro 1924 komenciĝis en la hispana esperantista movado grava konflikto inter katalunismo kaj oficialismaj tendencoj. Tiu kverelo, kiu tre damaĝis la funkciadon de la Hispana Esperanta Movado, daŭris kelkajn jarojn… fakte, ĝis la hispana CivilMilito (1936). Verdire, la konflikto ne estis problemo de la esperantista movado sed de la hispana socio ĝenerale. La malakordo interne de la E-movado de nia lando estis reflekto aŭ respegulo de la problemo de la regionaj naciismoj naskiĝantaj tiam en la hispana socio. Post la 4a Hispana Kongreso (2a de la Iberiaj esperantistoj), okazinta tiujare en Bilbao, la Kataluna Esperanta Federacio ne plu partoprenis en tiuj tutlandaj E-kongresoj. Paradokse, en la 5a Hispana Kongreso de Esperanto (3a Kongreso de la Iberiaj Esperantistoj), okazinta en Kordovo en la jaro 1925, partoprenis la Federacio de Portugalio, kiu estas sendependa lando de antaŭ kelkaj jarcentoj, kaj tamen ne partoprenis tiu Kataluna Federacio. En ĉi tiu kongreso oficiale naskiĝis **Hispana Esperanto Federacio**, nomo kiun portas ankoraŭ la land-skala organizo de la geesperantistoj de tiu-ĉi lando. La 6a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Madrido en la sekva jaro, 1926, sed ĝi jam ne havis iberan karakteron sed nur hispanan.



Ricardo Codorniu

En la jaro 1927 ne okazis Hispana E-Kongreso, kaj en 1928 estis la 7a, en Seviljo. Tiam jam oni sciis ke la sekva E-Kongreso, tiu de la jaro 1929, estos en la Asturia ĉefurbo: Oviedo.

Tio devigas nin atenti pri la tiama situacio de la esperantismo en nia regiono. Ni jam vidis tiun foton de la membraro de **Astura Esperanta Asocio** en majo de 1929, kaj ni sciis ke tiam ekzistis aliaj du E-grupoj en nia urbo, dependantaj de la Laborista Ateneo. Sed la situacio de Esperanto tiumomente, en Ĥiĥono konkrete kaj en Asturio ĝenerale, estis pli forta. Ni konstatos tion tralegante jenan transskribon el la **Analoj** de Marco Botella:

La hispana Esperanta Movado solidiĝis tiun jaron kiam la Esperantaj Grupoj de Oviedo kaj Gijón, ĵus refonditaj, kompletigis la mapon de tiu ĉeno de la nordaj Esperantaj Grupoj kiuj etendiĝis de post niaj veteranaj esperantistaj rondoj de Bilbao-Barakaldo tra Santander ĝis Asturio. La asturaj Grupoj ebligis la kontakton de tiu norda akso kun la entuziasmaj iam fervoraj galegaj esperantistoj de Lugo-Orense-Coruña-Santiago-Vigo… Niaj asturaj samideanoj strebis por nia afero tre efike dum la tuta jaro. Ili publikigis ofte artikolojn favore al Esperanto en la ĵurnaloj “El Comercio” kaj “El Noroeste” de Gijón, kaj ankaŭ en “El Carbayón, “La Región”, “La Prensa” kaj “La Voz de Asturias” de Oviedo. Elstara inter ĉiuj la tieaj esperantistoj estis Antonio Jiménez Mora, kiu en tute senlaca strebado faris el Oviedo unu el la fokusoj plej gravaj de Esperanto en Hispanujo. Jam en monato Januaro, li prelegis ĉe la Ateneo de Oviedo, kie li jam gvidis kurson de Esperanto speciale por virinoj; li ankaŭ organizis kaj gvidis alian por la georfoj de Centro de la Astura Deputitejo, kaj danke al sia persona influo, li atingis ke la Provinca Depititaro de Oviedo tiel multe interesiĝis pri Esperanto, ke tiu institucio invitis la hispanajn esperantistojn kongresi venontjare en Oviedo.

Tio, kion diras tiu teksto pri refondiĝo de la E-grupoj de Oviedo kaj Gijón ŝajnas ne esti tre ĝusta. Estas neniu indico pri neaktiveco de la grupoj de Ĥiĥono dum tiuj jaroj, Kaj la E-grupo de Oviedo estis fondita de tiu Antonio Jiménez Mora en la jaro 1927, do ne havas sencon paroli pri refondiĝo en 1928. Tiurilate la propraj **Analoj** kontraŭdiras sin mem ĉar en alia loko diras ke en tiu jaro 1927 la grupoj de Gijón kaj Oviedo fondis la **Asturan Esperantistan Federacion**, subgvide de Antonio Jiménez Mora mem. Do, ne sencas paroli pri refondiĝo de tiuj grupoj en 1928.

Tiu A. Jiménez Mora ne estis nov-alveninto en la Esperantista Movado. Oni scias ke li partoprenis en la Universalaj Kongresoj de Esperanto ekde la jaro 1907 al 1914 kaj eble ankaŭ en tiu de la jaro 1920 en Nederlando. Li gvidis kursojn de Esperanto en kelkaj lokoj kie li rolis kiel armea oficiro. Dum tiuj jaroj, 1926 al 1930 li estis en la garnizono de Oviedo kiel infanteria kolonelo kaj tie li fondis **Esperanta**n **Grupo**n **de Oviedo** kaj la **Astura**n **Esperantista**n **Federacio**n, kies Prezidanto